

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

VOL. I * N-RO 18/19 MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO JULIO/AŬG. 1933

Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio.

Kiel ni jam faris lastjare post la Universala Kongreso de Parizo, ni ankaŭ nun, post la Jubilea en Kolonjo, represas ĉi-sekve la jarraportojn de niaj lingvaj institucioj el la „Oficiala Raportaro“, tiamaniero diskonigante iliajn laborojn en vastaj rondoj de la esperantista publiko.

La Prezidanto al la membroj de la Lingva-Komitato

Karaj Kolegoj,

Mi forte sentas la devon, kiun via elekto trudas al mi.

Mi klopodos por plenumi ĝin kiel plej bone mi povos, sekvante la ekzemplojn de la grandaj esperantistoj, kiuj antaŭis min en tiu ĉi posteno.

Mi akceptis tiun multepezan respondecon nur ĉar mi pensis, ke vi donos al mi aktivan kunlaboradon; mi fidis, ke mi ne eraris.

Rollet de l'Isle.

Raporto de la Prezidanto de la Lingva-Komitato
(1932—1933)

Ĉar la prezidanto estas elektita nur antaŭ kelkaj semajnoj, ĉi tiu Raporto estas redaktita laŭ sciigoj de s-ro de Lajarte, sekretario, kiu funkciigis la administran parton de niaj Lingvaj Institucioj dum la ĵusa manko de estraro.

Lingvaj aferoj

Bedaŭrinde, Prof. Grosjean-Maupin, direktoro de la Sekcio „Komuna Vortaro“, ne povis, pro malsano, redakti sian kutiman raporton. Solvo estos alportata al la demando pri la vortoj proponitaj por oficialigo (5-a Oficiala Aldono), malĝuste prezentita la 30-an de junio 1932.

D-ro Lippmann redaktis sian raporton pri la Sekcio de Gramatiko, kaj s-ro Rollet de l'Isle sian raporton pri la Sekcio de Teknikaj vortaroj.

Administrataj aferoj

De kelkaj jaroj la morto trudas al Akademio dolorajn perdojn. En la Raporto de la lasta jaro, D-ro Lippmann, kiu redaktis ĝin pro neebleco de s-ro Warden, memorigis pri la morto de Prof. Cart; kaj, en tiu ĉi Raporto, la prezidanto havas la malĝojan devon memori pri la morto de sia antaŭulo s-ro Warden. Li jam estis grave malsana, kiam li estis elektata prezidanto por anstataŭi Prof-on Cart, kaj li eĉ ne havis tempon havigi al Akademio profiton de sia lingva kompetenteco kaj de la granda aŭtoritato, kiun donis al li la profunda respekto kaj simpatia estimo de la esperantistaro.

Pro tiuj gravaj perdoj, kaj aliaj kaŭzigitaj de foresto pro personaj motivoj, ni estu feliĉaj saluti la 25-an datrevenon de la elekto de nia nova vicprezidanto

s-ro Nylén. Efektive li estas elektita ĉe la fondo de la Akademio, en 1908, kaj li restas sola el la 9 unuaj akademianoj kune elektitaj en tiu momento. Ni rajtas pensi ke, dum multaj jaroj, ankoraŭ ni profitos lian grandan sperton kaj atestimindan kunlaboradon.

Elektioj de LK-anoj.

En 1932 elekto de LK-anoj laŭregule okazis kvankam iom prokrastitaj:

Estas elektitaj LK-anoj, ĉiuj kandidatoj pro ricevo de absoluta plimulto:

Elirantaj membroj: S-roj AYMONIER, BLICHER, CHAVET, KENN, ROLLET DE L'ISLE kaj D-ro Leono ZAMENHOF;

Novaj membroj: F-ino BAIRD kaj s-ro WADHAM (por la angla lingvo); s-ro SEVAK (por la armena); s-ro Oscar van SCHOOR (por la flandra); s-roj ARCHDEACON kaj COUTEAUX (por la franca); s-ro CSEH (Ĉe) (por la hungara); s-ro D-ro ORENGO (por la itala); s-roj BONNEVIE kaj BUGGE-PAULSEN (por la norvega); s-ro JIRKOV (por la persa); s-roj D-ro DOMINGUES kaj PORTO CARREIRO NETO (por la portugala); s-ro JANSSON (por la sveda), s-ro MIHALSKI (por la ukraina).

Notinde estas, ke ĝis tiam la lingvoj armena, norvega kaj persa ne estis reprezentataj en la LK, kies anoj estas nun 134.

La elekto de la LK-on okazontaj en 1933 (rebaloto de la elirantaj anoj kaj baloto de novaj — anstataŭe de la mortintaj aŭ eksigintaj membroj) estas nur en preparo, ĉar ĉiuj proponoj de la Naciaj Societoj aŭ respondoj de la samideanoj, kies kandidatecoj estas proponitaj de tiuj Societoj, ankoraŭ ne alvenis. Oni do devas prokrasti tiujn elektojn ĝis post la Kongreso. Ili certe okazos antaŭ la fino de l' jaro.

Elektioj de Akademianoj

En junio 1932 okazis balotado por elekto de tri akademianoj por okupi postenojn de Prof. Cart, prezidanto mortinta, s-ro Millidge, kiu ekzigis pro grave malbona sanstato, kaj Prof. D-ro Dietterle, vicprezidanto, kiu esprimis deziron rezigni ĉiujn postenojn en niaj oficialaj institucioj. Estas elektitaj Prof. Aymonier kaj s-ro Butler; sed tiu lasta ne akceptis la postenon.

Ĉar s-ro Warden, prezidanto, decidis rezigni pri la prezidanteco kaj eĉ pri la posteno ĉe la Akademio, fariĝis necesa nova balotado por anstataŭi s-rojn

Warden, Dietterle kaj Millidge. Tiu balotado okazis en februaro 1933, kaj estas elektitaj s-roj Rollet de l'Isle kaj Bennemann.

Ĉar necesis ne pli longe prokrasti elekton de la estraro, tiu elekto okazis en majo 1933, kaj estas elektitaj s-ro Rollet de l'Isle, prezidanto kaj s-roj Migliorini kaj Nylén, vicprezidantoj.

Detaloj pri tiuj elektoj estos donataj en venonta numero de Oficiala Bulteno.

Sekcio de Teknikaj Vortaroj

S-ro Rollet de l'Isle, elektita prezidanto de la Akademio, ne povas konservi direktadon de tiu Sekcio pro troa laborado, kaj la Akademio devos trovi anstataŭanton por tiu posteno. Atendante tiun solvon, s-ro Rousseau, nun sekretario de la Sekcio, okupos tiun postenon.

Financoj

La bazoj alprenitaj en Genevo por la nova organizo de la Esperanta movado aludas nek pri la situacio de la lingvaj institucioj ĝenerale nek pri subvencio al Akademio. Tamen estas certe, ke la nova UEA faros por la Akademio almenaŭ tion, kion faris IOK. Sufiĉos memorigi pri tio, kiam temos pri starigado de la definitivaj statutoj.

Rollet de l'Isle.

Parizo, la 20 junio 1933.

Raporto de la direktoro de la Sekcio de Teknikaj Vortaroj.

Verkoj de fakistoj publikigitaj de marto 1932:

En la 4-a numero de „Lingva Kritiko“ estas publikigita **Alp(in)isma terminaro** de s-ro H. Sirk (Jugoslavujo).

Medicina teknika Vortaro aperis; ĝi ne estas kopio de la provo aperinta en „Internacia Medicina Revuo“; ĝi estas tute nova eldono verkita de D-ro Briquet (Francujo).

S-ro Balkányi (Hungarujo) kompilis esperantan parton de **Vortaro por Skoltoj** en 4 naciaj lingvoj kaj Esperanto.

La traduko de la kvina volumo de la seslingva vortaro de Schlomann, **Fervoja Fako**, kompletigis dank' al s-ro Rosher (Usono).

S-ro Paul Neergaard (Danujo) publikigis gravan verkon pri **Fremdvortoj en Esperanto** (la 15-a regulo en teorio kaj praktiko) en kiu li studas: naturon kaj fondon de la fremdvortoj; starigon de principoj aplikeblaj je elekto de Esp.-formoj de fremdvortoj; analizadon de fremdvortoj laŭ la starigitaj principoj.

S-ro Karlo Gerber (Germanujo) komencis **Abelkulturan terminaron**.

S-ro Lorenzo Korinna (Anglujo) verkis **Lanindustrian vortaron**; ĝi entenas tradukojn en 4 naciajn lingvojn de esperantaj terminoj, kaj angla-esperanta vortareton.

S-ro Hohlov (USSR) tradukis el rusa lingvo verkon de Ing. A. A. Sufanov pri la **Unua Soveta Blumingo**; ĉe la fino estas tabelo de teknikaj vortoj uzitaj kun tradukoj en 5 naciajn lingvojn; inter ili estas dudekunu novaj radikoj.

En Bulteno de Esperantista Unio (Moskvo USSR) komenciĝis publikigado de **Sportterminaro** rilata al korpokultura konkuro; ĝi entenas komandojn kaj priskribadon de la ĉefaj ludoj, ekz.: Piedpilko (Futbalo).

En la „Luma Oriento“ (Japanujo) aperas **Budhisma Terminaro**.

Rollet de l'Isle.

Parizo, marto 1933.

Raporto de la Direktoro de la Sekcio „Gramatiko“.

Altestimata Sinjoro Prezidanto!

I.

En mia lasta Raporto mi preparolis tiujn paragrafojn el la Rezolucio de la Lingva Konferenco en Arnhem, kiuj koncernis la gramatikon, petis la L. K. anojn, precipe la Akademianojn komuniki al mi siajn opiniojn aŭ studrezultojn pri la nomitaj temoj kaj provis plifaciligi ties esploron per diversaj rimarkigoj kaj fontindikoj. Tiam mi supozis, ke la Prezidanto de la Akademio konforme al la 16a artikolo de la Regularo decidus, ĉu la deziroj de la Arnhem-a Konferenco estu plenumataj, kaj eventuale elektos la temojn, pri kiuj la Gramatika Sekcio verku raporton. La treege bedaŭrindaj malsano kaj morto de sinjoro WARDEN, nia antaŭa Prezidanto, nebligis tion. Tial la afero estas ankoraŭ nun en la stato de la lastjara Raporto.

Mi esperas, ke post la reorganizo de la Akademio tiuj taskoj povos esti laŭcele prilaborataj, tiom pli, ĉar ankaŭ vi mem intertempe jam montris vian intereson per sendo de via artikolo pri la demando: „**Ĉu la esperantaj radikoj havas gramatikan karakteron?**“. Resume vi tie konstatis:

„**Teorie kelkaj el la radikoj havigas per si mem impreson de gramatika karaktero — sed praktike fiksado de tia karaktero al ĉiu radikoj ne necesas, kaj la Akademio devas eviti tian decidon, kiu malplifaciligas senprofite la lingvon.**“

Eble el ĉi tio oni povas konkludi vian deziron lasi nekoniderita la paragrafon 7 de la Arnhem-a Rezolucio.

Prave mi estis atentigata al tio, ke inter la laboroj pri la problemoj de la gramatika vortkaraktero, kiujn mi citis en mia lasta Raporto, mankis la libro de WÜSTER: *Internationale Sprachnormung in der Technik* (precipe ties paragrafoj 843,4 kaj 842,4). Tie (p. 314/315) WÜSTER diras interalie:

„La principo, ke ĉiu vortelemento en Esperanto havas difinitan gramatikan kategorion same kiel en la lingvoj naciaj, ne estas oficiala. Sed efektive ĝi regas la vort-derivadon ankaŭ en Esperanto; sen ĝi la vortelementoj ne havas fiksitajn signifojn, la principo de sufiĉo iĝas sensenca.“

II.

El novaj libroj gramatikaj mi mencias:

Paul NBERGAARD, *Fremdvortoj en Esperanto*.
Alessandro MAZZOLINI, *Ekzercilo por Supera Praktika Kurso de Esperanto* (2a eldono) kaj *Helpilo*, *Gvidlibreto* aldonita.

C. WALTER, *Gaja Lernolibro de Esperanto por Meminstruado kun bildoj de Peter THIENHAUS*.

III.

En Esperanto-gazetoj aperis jenaj gramatikaĵoj:

En *Lingva Kritiko*: Vol. I N-o 5 JUNG, La „problemo“ ata — ita. — BOUCON, Ankoraŭ pri ata kaj ita. — STEINER, SCHATTAT, LA COLLA, Pri karesa sufikso. — N-ro 6 DEGENKAMP, Antaŭ ol, antaŭ kiam. — SCHATTAT, Grupo-regoj. — MIGLIORINI, Pri la objektiva genitivo. — NYLEN, „Virĉevalo“ aŭ „ĉevalviro“. — BOUCON, KIU kaj KIO kiel relativaj pronomoj. — N-o 7 MALMKVIST, Pri la uzado de „kio“ kiel

relativo. — LIPPMANN, Raporto de la Direktoro de la Gramatika Sekcio. — N-o 9/10 WARRINGHIEN, Letero al Teo Jung pri la pasivaj participoj. — CALLOENS, Pli — plu — ankoraŭ — jam. — N-o 11 BAUMAN, Tempaj rilatoj. — JUNG, Refoje la „problemo“ ata — ita. — PADFIELD, Pri „ata—ita“. — N-o 12 SCHATTAT, Pri la prepozicio „de“. Novaj afiksoj. — ENG-HOLM, Aoristo. — GROSJEAN-MAUPIN, Kompletiga rimarko pri la objektiva genitivo. — BAUMAN, Lingvaj rimarkoj (Duono da [de] horo. Kelkaj aŭ kelke da. Signifo de „ig“). — ROBO, Mortema. — N-o 13 PORTO CARREIRO NETO, La formoj „ata“ kaj „ita“ en la Zamenhofa uzado. — N-o 14 BAUMAN, „Vi“ kaj „ci“. Uzo de „aĉ“ por certaj vortoj. Propozicio, frazero kaj klaŭzo. — JUNG, Pli bona stilo per dispartigo de longa frazo. — N-oj 15 kaj 16 TAKAHASI (kaj LIPPMANN), Pri la refleksiva pronomo. — N-o 16 F. J. B., Kondiĉa modo. — SIECHE, La „mal-vortoj“. — N-o 17 PENNDORF, LA Zamenhofa tabelo. — KALOCSEY, Pri la pasivaj participoj kun Postrimarko de JUNG. — K., Teknikaj vortoj por gramatikaj konceptoj. — BALKANYI, Prepozicio „de“. — Krome demandoj kaj respondoj pri fonetiko (bs, ds, sb, zt, kb, kz), onies, onia, ali(i)u,

ali(i)es k. s., uzo de „per, de, da“, (n-o 6); -ata, -ita (n-oj 9/10, 14, 17); participa adverbo, danki pro aŭ por, duoble — pli (tiel) — alta, aliloke ol, kiel — kvazaŭ, (la) U. E. A., de (l') U. E. A. (n-o 9/10); refleksivo (n-oj 11, 12, 17); fum(i)gi (n-o 11); (laŭ tio) se aŭ ĉu, ĉu — ĉu, se — aŭ, preferi al, super, je, antaŭ, predikata adjektivo (participo), ellaso de „ke“, „nek“ anstataŭ „eĉ ne“, legado de libro, legado libron, legante fibron, la venkinto de aŭ en la batalo, antaŭ ol aŭ kiam, (n-o 14); ŝi estas malfru(int)a, kazo en nekompleta „se“-propozicio (n-o 17).

En Germana Esperantisto: DI-, La uzo de „ajn“. — Esperanto-Lehrgang (1932 p. 151; 180, 194).

En Literatura Mondo 1932 9-a n-o p. 156: LOTI, Pri neŭtra gramatika sekso.

En La Revuo Orienta daŭre aperas gramatikaj laboroj japanlingvaj. En la n-o de Julio 1932 (p. 247) TAKAHASI kaj LIPPMANN traktis specialaĵojn el la uzo de la pronomoj.

Mi salutas vin, sinjoro Prezidanto, kun plej alta respekto

D-ro Walter Lippmann.

Leipzig, en junio 1933a.

Pri la metaforo en internacia lingvo.

Prelego farita dum la Somera Universitato de la Jubilea 25-a Kongreso de Esperanto en Kolonjo.

De Prof. W. E. Collinson, Liverpool.

Mi permesas al mi, unualoke esprimi kordan dankon al la LKK pro ĝia afabla invito, ĉar ĝi donis al mi bonvenan okazon reviziti la belan urbon, en kiu mi pasigis antaŭ la milito tri el la plej agrablaj kaj interesoplenaj jaroj de mia vivo, estante lektoro pri la angla lingvo en la tiutempa „Handels-hochschule“.

La problemo de la metaforo en internacia lingvo estas eksterordinare grava. En sia plej ĝenerala senco la metaforo estas la plej utila ilo kaj la vera animo de la literaturo. Nu, kontraŭuloj de konstruita internacia lingvo senĉese kaj senlace asertas, ke ĝi per sia naturo mem neniel povas taŭgi por literaturaj celoj. Se ni do sukcesas klare demonstri ke Esperanto jam posedas grandan provizon da metaforoj kaj krome havas kapablon ĉiam krei novajn, ni faras grandan paŝon antaŭen por pruvigi la pravecon de niaj pretendoj al literaturo. Necesas akcenti la fakton ke ambaŭ postuloj devas esti plenumitaj; se lingvo posedas nur kliŝaĵojn, metaforojn, kiuj estas senvivaj kopioj el aliaj naciaj lingvoj kaj se la lingvo ne povas reŝeigi kaj renovigi sin, ĝi povas interesi nin kiel „evoluintaĵo“ (ĉe Vossler: *Entwicklung*), sed ne kiel „kreskaĵo“ (Vossler: *Schöpfung*), alivorte ĝi povas servi por menĉi ĉambrojn aŭ varojn aŭ plej altkalkule por raportoj pri sciencaj observoj kaj eksperimentoj, sed la artistoj kaj verkistoj originalaj ne povus uzi tian lingvaĉon por ekkapti siajn disfluemajn sentojn kaj pensojn kaj komuniki ilin al ni sen perdi multe de ilia individueco kaj freŝeco.

Kompreneble mi ne estas la unua esperantisto, kiu rekonis la gravecon de la metaforo: Ni ĉiuj ŝuldas multon al Privat pro lia „Esprimo de Sentoj en Esperanto“.

Por ekkoni la signifon de metaforo ni prenu simplan frazon kia: la ŝipo veturas

trans la maron. Se mi pensas pri la kilo de la ŝipo, kiu estigas vojon tra la ondoj, ni povas eble diri: la ŝipo traveturas la ondojn. Sed kiom pli forta kaj energia estas la impresado farita de la ŝipo traplugas la ondojn! La baza fakto restas sama, sed ni trovas tri diversajn gradojn de imponkapablo en la esprimo de tiu fakto. Se ni logike analizas la frazon kun traplugo, ni povas konkludi, ke temas pri analogio aŭ komparo starigita inter la agado de ŝipo tra maro kaj tiu de plugilo tra kampo; la ŝipo faras vojon, la plugilo faras sulkon. La „atmosfera“, la asociaĵoj aŭ krompensoj kaj kromsentoj de plugado estas transpremitaj kaj donitaj al la ŝipveturado. Metaforo, do, estas, kiel ĝia greka origino sugestas, „transporto“ aŭ „transdono“ de signifo kaj de sent-muanco.

En mia ekzemplo estis facile eltrovi per analizo la sperton komparitan kaj starigi proporcion de la formo: ŝipo rilatas al maro kiel plugilo al tero. Tamen estas necese nin gardi kontraŭ la juĝo, ke metaforo estas pure kaj simple krompremita aŭ kuntirita komparo. Por esplori la komplikajn problemojn de la naturo kaj deveno de metaforoj, la plej fundamenta verko estas tiu de Hermann Pongs, „Das Bild in der Dichtung“ (vol. 1, eld. 1927). Sed jam antaŭe mi povas doni du ekzemplojn por montri, kiel senpere kaj spontanee metaforoj povas esti ĝi en la infana parolo. Unu matenon mia fileto rigardis, dum mi razis min super lavujo plenigita de akvo, kaj li vidis kelkajn pecetojn da saĝsaŭmo fali sur la akvon, sur kies surfaco ili formis rondajn figurojn; tuj li ekkriis „rozoj“. Ĉe alia okazo mi trovis la infanojn starantaj ĉe la fenestro por rigardi la pluvon, kiu faladis en longaj strekoj sur la akvon jam kolektigitan sur la ĝardena vojo. Ĉiufoje kiam pluvstreko sur-

trafis la akvon, ĝi faris turnakveton kun konusforma supro, kaj tion la infanoj esprimis per la vorto „spinning tops“ (germ.: „Kreisel“, Esp.: „turboj“). En ambaŭ kazoj — mi kredas — la komparo estis farita sub la sojlo de la plenkonscio kaj la vortoj aperis spontanee.

En la verko menciita Pongs starigas jam ĉe la komenco gravan distingan inter metaforo (germ.: „Metapher“) kaj bildesprimo (germ.: „Bild“). Li konstatas la fakton, ke metaforo en pli preciza senco antaŭsupozas komparon, eĉ kiam la komparo plenumiĝas subkonscie. Por li temas ĉe la metaforo pri la interrilatigo de objektoj ĉirkaŭ ni, pri aĵoj de la reala mondo ekzistantaj en la spaco kaj montrantaj kelkajn komunajn trajtojn aŭ similecojn al la atenkama okulo aŭ alia sentorgano. La metafora agado estas do racia, intelekta procedo, kiu dismetas kaj kunmetas mian sperton de la reala mondo. La „rozoj“ kaj „turboj“ de miaj infanoj estas certe tiuspecaj. Aliflanke la bildo estas por Pongs elpuŝo, projekcio de la nekonscio, ĝi elleviĝas el la maŝuma profundo de la animo por enkompigi ion luktantan por trovi esprimon. La poeto kiu uzas bildon, do, agas ne tiom racie kaj intelekte kiom intuicie; li ne zorgas komparas, rezonas kaj konkordas, sed ekkaptas per subita rekonon la ideon de iu ajn analogio kun la ideo esprimota kaj esprimenda. Li ne havas sian elirpunkton en la ekstera mondo, sed en la interna mondo, en si mem, kaj tiu mondo estas por li estiĝado, malvolviĝo en la tempo de ideoj, kies forflugemajn elementojn li apenaŭ ekperceptas, dum ili preterŝvebas, kaj tiujn ideojn li provas fiksi per bildoj. Poste mi citos kelkajn trafajn ekzemplojn el moderna verkisto.

En pli vasta senco la metaforo, nome la transmeto el unu sfero en alian, la inter-

ŝanĝo inter diversaj sferoj, apartenas al la naturo de ĉiu ajn lingvo. Escepte la simplan indikadon aŭ tuŝon de objekto per fingro eĉ gestoj estas „transmetoj“. Oni kopiaj ekzemple la konturon de objekto kiel taso per kava vazo figurita de la du manoj. La Napoleono iras multe pluen, kiam li montras la pasintan tempon per returno de la kapo aŭ la mensogon per fingro tuŝanta la maldekstran buŝangulon kaj moviĝanta en oblika direkto malsupren. Tiu lasta kutimo memorigas nin, ke ni ofte parolas en la naciaj lingvoj pri rekta kaj nereakta parolo aŭ ago. Niaj personaj gestoj estas ofte klaraj manifestadoj de internaj animstatoj. Instinkte ni frapas sur la tablon per la pugno, kiam ni koleras, aŭ por montri nian indiferecon, senzorgecon, flegmon aŭ memsufiĉecon ni kunplektas la brakojn kiel Napoleono. Kiel Pongs diras, ĉiuj tiaj gestoj rilatas al la unua persono, al la „mi“, sed ekzistas aliaj por esprimi rilaton al la dua persono, la „ci“ aŭ „vi“. Por montri nian amon aŭ simpatian ni larĝe malfermas la brakojn al ju kaj tiu gesto naskas en la angla kaj franca lingvoj **embrace** aŭ **embrasser** t. e. „ĉirkaŭbraki“ religion. Aŭ ni montras ĝojon en keesto de alia per danco aŭ salto, kaj de tio devenas la frazo **salto pro ĝojo**. Kelkfoje ni sentas la „mi“-econ, solidarecon inter „mi“ kaj „vi“. Tiun interrilaton ni esprimas per diversmanieraj salutoj, manpremoj ktp. kaj etendas la rilaton al abstraktaĵoj, ekz. mi **salutas la novan organizon** ktp. Ankorau ni ne ekdeŝpis la eblecojn, ĉar Pongs esplorante pli profunden montras, kiom forte ungas al ni esprimi per gestoj nian respekton, timon, admiron kaj sopiron al ju forto aŭ potenco kiu suferigas nin ĉiujn, min, vin kaj min egale. Tamen pri la kerno de la religia sento, en kiu la germana filozofo de religio Otto distingis la senton de io majesta, timiga, teruriga, tremiga (do de li nomita „tremendum“) kaj la senton de la alloga, alvoka, kunsenta kaj ĉio-ama (kion li nomas „fascinosum“). Nian senhelpecon en la keesto de la plej granda potenco ni montras per **genuado**, **adorado**, **silento**; nian sindonemon per la etendo de la manoj en la preĝo.

La gestoj cititaj kaj la bildaj aŭ metaforaj esprimoj dependantaj de ili estas komun-eŭropaj. Ĉu ili estas ikrome komunaj al la civilizitaj nacioj de la Oriento, mi ne scias. Se la kutimaj gestoj tro malsamas, estus kompreneble iom danĝere enkonduki en Esperanton esprimojn bazantajn sur ili. La tuta demando postulas pluan esplorado.

Alia provizo da metaforaj esprimoj almenaŭ ikomuneŭropaj troviĝas en miaj literaturaj lingvoj dank' al 1. la **Biblio**, 2. la **antikvaj klasikuloj** kaj 3. tiaj migrantaj fabelaroj, kiaj la „Mit kaj unu noktoj“. Eksterordinare riĉa trovejo de trafikaj metaforoj estas la Zamenhofa traduko de la Malnova Testamento. Scivoleme mi iam trarigardis la ĉapitron pri la Biblio en „**Geflügelte Worte**“ (= Flugilaj Vortoj) de Büchmann por konstati, kiom da bibliaj bildesprimoj havas saman gradon de konateco aŭ familiareco en la muna angla kiel en la germana. Mi vere surprizigis pri la granda abundo de tiaj esprimoj enirintaj la ĉiutagan lingvon de ambaŭ popoloj. Jen estas eta kolekto da esprimoj esperantigitaj laŭ la Zamenhofa teksto: la **arbo de vivo**; la **arbo de sciado**; **osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno**; **lando en kiu fluas lakto kaj mielo**; **sidi super la potoj kun viando**; **punadi per skorpionoj**; **meti sur sin sakojn kaj cindr-**

on; **ilia lango algluiĝas al la palato**; **ĉu negro povas ŝanĝi sian haŭton?** ktp.

Sed ankaŭ la Nova Testamento kontribuas al Esperanto siajn riĉaĵojn, ekz. **meti la lampon sub grenmezurilon**; la **salto sensustiĝis**; **loko kie nek tineo nek rusto konsumas**; **elporti la ŝarĝon de la tago kaj la varmegon**; **elkribri la kulon kaj gluti la karmelon** ktp. Malofte la germana lingvo, ekzemple, pli kutimiĝis uzi certan esprimon (eble post forĝo de la origino) en la ĉiutaga vivo, dum la angla ne alprenis ĝin tiucele. Por esprimi la ideon „flegi kaj prizorgi amatan virinon“ germano diras: „er wird sie auf den Händen tragen“, adaptante vortojn el la naŭdek-unua psalmo (sur la manoj ili vin portos); kontraŭe la angla ne konas tian familieran uzon. Kelkfoje ni trovas diferencen en specifaj vortoj. En la dua tetero al la Korintanoj Paŭlo diras laŭ la Esperanta traduko: **dornego por la karno**. Luther diras „ein Pfahl (splitaĵo) im Fleisch“, sed la angla „a thorn in the flesh“. Tamen, por esprimi ion ŝokante malbelan la angla preferas „an eye-sore“ (t. e. io kio vundas la okulon) kaj la germana „ein Dorn im Auge“. Do, necesas denove iom da antaŭzorgemo, kiam ni adoptas por la komuna lingvo en Esperanto bibliajn diraĵojn.

Sama hezitemo postuliĝas por la klasikaj klisajoj. Kiu ne konas almenaŭ kelkajn el la **laboroj de Herkuleso** kaj el la **fabloj de Ezopo**? Do, oni facile komprenas aludon al la **hidro**, al la **stalo de Aŭgiaso**, al **reĝo Cikonio**, al la **vinberoj maldolĉaj aŭ al la parto de la leono**. La Esperanta verkisto povas plenrajte adopti tiajn esprimojn kiaj la **kesto de Pandoro**, la **ora epoko**, la **cigna kanto**, la **pomo de disputo**, la **kalkano de Ahilo** ktp. Eĉ multe pli modernaj metaforaj esprimoj fariĝis vere internaciaj; ekz. **tiri la kaŝtanojn el la fajro** (ĉe La Fontaine); **ŝtormo en glaso da akvo** (angle: „a storm in a tea cup“); **sezamo**, **malfermu vin!** (en la Mit kaj unu noktoj); la **lasta Mohikano**, **enterigi la hakilon de milito**, **fumi la pipon do paco** ktp. — el J. Fenimore Cooper; la **politiko de la nefertita pordo**, la **honesta makleristo** kaj aliaj trafikaj vortoj el la historio. Mi eĉ ne hezitus uzi en Esperanto **bluŝtrumpolino** (ĉar mi havas angle „blue stocking“, germ. „Blaustrumpf“, france „bas bleu“ ktp.) aŭ **filistro** en la senco de „homo sen idealo kaj indifereca por ĉio-alta“.

Se ni volas esperantigi tiajn eŭropismojn, estus ĝentile demandi, ĉu la ĉinoj, ĥindoj kaj japanoj deziras, ke ni konsideru nombron da orientaj diraĵoj, ĉar ili certe povus helpi nin riĉigi nian metaforaron. Kiel gvidilo por la esperantigo ni povus preni la bonegan Proverbaron de Zamenhof, en kiu li elektis kaj Esperantospirite adaptis esprimojn el multaj lingvoj inkluzive de la slavaj. Jen kelkaj ekzemploj de Zamenhofaj adaptaĵoj: **droni en detaloj**; **sieĝi ies pordon**; **draŝi fojnon**; **elverŝi sian koleron**; **ŝviti super tasko**; **li estas vera hidrargo**. **Sidi sur pingloj** estas certe pli akceptinda ol mia angla „be on tenter-hooks“, laŭvorte „esti streĉata sur hokoj“. Plej sukcesa estas liaj rimdiraĵoj kiaj: **se ne estus se kaj tamen / mi al ĉio dirus amen aŭ akvo kura / akvo pura**. Kelkfoje li ŝanceliĝas anstataŭ fari definitivajn elekton: oni povas aŭ **ĉerpi akvon per kribrilo aŭ batadi la venton aŭ tordi ŝnurojn el sablo** — ĉiuj esprimoj cetere sufiĉe pitoreskaj kaj kompreneblaj en la parola situacio.

Ekster la fontoj cititaj, nome la Biblio, la klasikaj verkistoj kaj la Proverbaro de Zamenhof ekzistas jam multoj da metaforoj en

Esperanto, kiel oni povas tre facile konstati, trafolumante la paĝojn de la Plena Vortaro. Multaj el ili venas el sferoj de sperto komuna al la plej granda nombro da homoj — la partoj de la homa korpo, uzataj absente, la bestoj kaj ilia konduto, la kreskaĵoj, la fenomenoj de la naturo, la kvalitoj de objektoj, homaj laboroj, la tekniko kaj kulturo modernaj. Ĉiu spertokampo povus postuli apartan laboron. La korpopartojn en metafora uzo mi priskizis en artikolo en „Literatura Mondo“. Mi povas, do, kontentigi je la cito de du eksterordinare trafikaj bildoj el la finna nome la nuko por la supera rando de akvoŝalo, tie, kie la akvo komencas transversigi, kaj la oreloj por ambaŭ ekstremaj de la brustaltaj muroj de ponto finiĝantaj per kurboj eksterflanken.

La geografio alprenis masope tiajn vortojn: **markolo**, **terkolo** kaj **montkolo**, **ternazo** kaj **terlango**, **montodorso** kaj **montodentoj** ktp. tiom, ke oni plenrajte povas paroli pri la **vizaĝo de la tero**. Inverse la naturfenomenoj ankaŭ pravigas bildojn, ekz. **pluvo da leteroj**, **nuboj de dubo**, **roko de firmeco** ktp. Ĉu eskimo povas kompreni aludojn al miaj bestoj kaj kreskaĵoj, estas dubinde; mi refoje ŝatus demandi, ĉu eĉ orientulo komprenas tuj la jenajn: **hunda vivo** (angle: „dog's life“, germ. „Hundeleben“); **vivi kun iu kiel hundo kaj kato**; **li estas ŝakapa**, t. e. stulta; **ŝafe imiti iun**; la Zamenhofa esprimo **vivi kiel koko en butero** (preferinda ŝajnas al mi la alternativa **vivi kiel koko grasigita** aŭ eĉ pli bone **grasigata**). Japano plej verŝajne facile komprenas la metaforan uzon de **branĉo**, **radiko**, **floro**, **frukto**, **kerno**, **folio**, **ĝermi**, **burĝoni**, **ekflori**, **dissemo** kaj aliaj, ĉar se mi ne eraras, li konas en certa lingvostilo ekz. **floro de la ondoj** kiel esprimon por la „salto“. Ankaŭ la senc-etendo de dimensiaj kaj similaj adjektivoj (**alta**, **granda**, **larĝa**, **glata**, **mola**) aŭ de sens-perceptaj adjektivoj (**acida**, **amara**, **dolĉa**, **freŝa**, **hela**, **varma**), de multaj agoj kiaj **tiri** (kuntiri), **premi** (kunpremi), **rompi** (amikecon), **peŝi**, **levi** (la spiriton) ktp. estas verŝajne pli malpli komunhoma kiel multaj homaj laboroj, ekz. en la frazo: **la poeto ĉizas siajn versojn**, kiujn ni **gravuras** en la memoron, la dramverkisto **masonas aŭ ĉarpentas** tragedion, por kiu li **teksas intrigon** ktp.

Komuneŭropa sed ne komunhomara, tamen, estas la terminoj de la kristana religio kiaj **angelo**, **diablo**, ricevi la **bapton de fajro**, **mi benas la tagon**, **kiam li aperis**, la **ĉielo**, la **infero** ktp. Aliflanke fariĝas iom post iom internaciaj la terminoj de la moderna sporto kaj teknologio kaj ne estas malfacile kompreni la sencon de li estas **nur gramofona disko de la opinio** de aliaj aŭ eĉ por akceli iun: **pli da gaso!** (Germ.: „Gas geben“, angle: „step on the gas“). En tiaj kazoj Esperanto povas marŝi egalpaŝe kun la naciaj lingvoj.

Kaj kompreneble Esperanta verkisto havas saman kapablon krei novajn metaforojn, kiel iu nacia verkisto. Por pruvu tion oni povas multon citi el miaj originalaj verkistoj Privat, Stellan Engholm, Jean Forge, Raymond Schwantz kaj multaj aliaj, sed mi preferis fari alian teston. Mi, kiu estas anglo, tralegis tre zorge kelkajn verkojn de la germana filozofo de religio, Prof. Karl Heim el Tübingen, kiu estas konata pro sia utiliĝo de tre bildoriĉa stilo por igi klaraj siajn tre profundajn meditadojn pri religiaj problemoj. Fakte mi trovis, ke ju pli originala aŭ nefamilara estis la bildesprimo, des pli rapide kaj rektlinie mi povis atingi la komprenon. Jen kelkaj bildoj kiuj certe povus

tradukiĝi en ĉiun kulturlingvon: 1. (por montri la vizon, kiun nur la malŝeliĉulo povas havi de Dio) oni kelkfoje vidas el la profundo de ŝakto dum la krepusko stelon, kiun oni ne povas vidi en la hela lumo supre; 2. per la postulato de la intelekto ni povas sendi ŝagon de sopiro, sed ili neniam atingas la alian bordon; 3. (pri certaj grandaj

personoj) ili similas al elektraj fortokampoj, kies magnetajn influojn ĉiu pasanto povas sperti; 4. la ardanta lafo de l' pra-kristanismo devas denove elverŝiĝi el la profundo kaj detruu la templojn kiujn konstruis la homoj.

Ĉu ĉio tio sufiĉas por elmontri ke Esperanto havas metaforojn? Mi esperas ke jes!

nomo de multaj amikoj!) proponas eljeti en la dirita tabelo da vortoj la literon i kaj (por ke ne maskiĝu io tute nova) anstataŭigi ĝin per apostrofo . . . sekve la provajn (dume nur permesatajn sed ne devigajn) formojn: ia, ial, iam, iel, ies, io, iom, iu; k'a, k'al, k'am, k'e, k'el, k'es, k'o, k'om, k'u; t'a, t'al, t'am, t'e, t'el, t'es, t'o, t'om, t'u; ĉ'a, ĉ'al, ĉ'am, ĉ'e, ĉ'el, ĉ'es, ĉ'o, ĉ'om, ĉ'u;

nen'a nen'al, nen'am, nen'e, nen'el, nen'es, nen'o, nen'om, nen'u.

La vortoj k'e, ĉ'e, ĉ'u ja fariĝas tiel tute similaj je la vortoj ke, ĉe, ĉu, kiuj havas jam alian signifon; tamen tio ĉi ne malhelpas: en la skribado vi ĉiuj facile diferencigos per ilia apostrofo, en la elparolado per ilia uzo kaj pli forta akcento . . . La mallongeco de la interŝtataj pronomoj kaj adverboj estas aparte grava por la verstistoj."

Jen la nova projekto! Sed (sur p. 152) Zamenhof devis konstati, ke tiu punkto 4 de liaj proponoj estas absolute ne akceptebla, ĉar pli ol duono da voĉoj estis kontraŭ ĝi, kaj li modeste sin submetis al la decido de la plimulto. Tamen li iom sin pravigas per jena rezonado: „La propono tute ne estis farita en unu minuto, ne pripensinte la sekvojn, kiuj kelkaj amikoj pensas; la unua impresio, kiun faras tiu ĉi propono estas la timo, ke ni ricevus konfuzon kun diversaj aliaj jam ekzistantaj vortoj; sed tiu ĉi konfuzo estas nur ŝajna . . . kiu farus vastajn provojn, tiu eble baldaŭ konvinkigus, ke la afero ne estas tia, kiuj oni pensas, tiom pli, ke mi ĝin proponis precipe por versoj, kiuj, estante lukso, povas permesi al si deklariĝon."

Cetero, kiuj ŝajnas al mi, Zamenhof havas por sia propono ankaŭ alian motivon por gravan, ol longeco aŭ mallongeco de la formoj. Ĝi bazas sur tio, ke la vokalo i ja origine karakterizas nur la nedifinajn vortojn; konsekvence ĝi estas ne necesa, superflua, eĉ kontraŭprincipe en la formoj demandaj, montraj, komunaj, neaj. Tamen laŭ la nuna stato estas tute ne konvene, iel reformi aŭ ŝanĝi la tabelajn vortojn. Krome mi atentigas pri simila fakto. Al la radikoj: i, ki, ti, ĉi, neni' certe aliĝas la personaj pronomoj: mi, (ci), li, ŝi, ĝi; ni, vi, ili; si, oni'; deriviĝas la posedaj: mia, (cia), lia, ŝia, ĝia; nia, via, ilia; sia, omia' — ĉiuj kun 'a vokalo i, karakteriza por ĉiuj pronomoj; troviĝas ankaŭ substantive la mio' (san e kiel kio, ĉio').

Do rezultas: eĉ la majstro vane prov' laŭsi la fundamenton.

La Zamenhofa tabelo.

De J. Penndorf, Plauen.

(Daŭrigo kaj fino.)

El la 9 finajoj, kiujn la aŭtoro citas laŭ la alfabeto, kvar (a, o, u, es) apartenas al la pronomoj, kvin (e, el, al, am, om) al la adverboj.

Certe la adjektiva finajo -a markas eonkvakiton, la substantiva -o signifas ĝenerale nedifinitan objekton kaj -u personon, beston aŭ difinitan objekton. Do -u apartigas kiel speciale pronomo finajoj; laŭ sono ĝi ja plej multe similas al o; cetero en naciaj lingvoj simile diferencas: tis, ti (greke), quis, quid (latine), chi, che (itale), qui, que (france), who, what (angle), wer, was (germane), kto, čto (ruse), kto, co (pole). La vortoj kun la finajo -o estas ĉiam memstaraj, la vortoj kun -u, -a estas aŭ memstaraj aŭ atributoj al substantivoj.

Krome (pro oportuneo, ne neceso) Zamenhof aldonis la finajon -es, por montri la posedanton; ĝi devenas evidente el la germana lingvo: komparu la proverbon: „Wes Brot ich esse, des Lied ich singe", t. e. „kies panon mi manĝas, ties kanton mi kantas."

La adverboj celas cirkonstancojn de loko, tempo, kaŭzo, maniero, kvanto.

La kutima finajo por adverboj derivitaj de adjektivoj estas -e. Ĉi tiun finajon Zamenhof elektis speciale por la lokaj adverboj. Pro tio oni ja trege lin riproĉis; ĉar -e nature konvenus al la adverboj de la maniero. Sed certe li tiel agis ne sen grava motivo. La afero estas jena: ekzistas entute triobla difino de loko: 1. por la restado en iu loko, 2. la proksimiĝo al — kaj 3. la foriro de iu loko; komparu ekz. la lingvojn hic, huc, hinc'. Zamenhof forigis la trian kazon, aplikante la prepozicion de (ekz. „de kie vi venas?"); sed por montri la direkton, li ĝenerale (laŭ regulo 13) uzas la finajon -u. Pro tio li bezonas antaŭirantan vokalon, sed restas nur -e. Tial li fiksis la finajon -e, por esprimi la restadon en iu loko, kaj -en por la direkto: ie — jen, kie — kien, tie — tien, ĉie — ĉien, nenie — neniem.

Ŝercante nun sufiksojn por la adverboj de la maniero kaj de la tempo, li kreis la silabojn -el kaj -al, verŝajne laŭ modelo de la sufikso -al; komparu ankaŭ -ul kaj la partikulojn „ol". La tempajn adverbojn komence karakterizis la sufikso -an, memoriganta pri germanaj formoj „dann, wann". Nur en la aldono al la dua libro' (1888 — Zamenhof, originala verkaro, kompilita de D-ro Dietterle, p. 32) la aŭtoro konstatas: „La sola ŝanĝo, kiun mi trovas necesa fari mom, estas: anstataŭ jian, ĉian, kiam, neniem, tiam' devas esti jiam, ĉiam, kiam, neniem, tiam', por malegali la vortojn jian' etc. kaj jian' (akuzativo de ja') etc." Felika movigo, ĉar tiel la tempaj adverboj asimiliĝas al la kvantaj kun la finajo -om, konforma al latinaj „tantum, quantum"; aliflanke estiĝas tia vico: io : ĉio : ĉio : ĉio.

Cetero la karakterizaj finajoj de la formvortoj (u, es, el, al, am, om) ne estas memstaraj elementoj ĝenerale uzebaj; do ekz.

ali-u, ali-es, ali-el ktp. estas ne permesablaj kunigoj (komparu „Lippmann, Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten, n-ro 61").

La speciala montra vorteto „ĉi", sendube devenanta el la franca lingvo (celui-ci) estas ne sufikso, sed memstara, libere ebla vorteto, laŭ arbitro antaŭ- aŭ postmetebla. Zamenhof mem refero (originala verkaro, p. 151) atentigas pri tio: „La formoj kun „ĉi" (tiu ĉi, tie ĉi k.c.) estas maloportunaj per tio, ke ili ne permesas la formadon de adjektivoj kaj aliaj partoj de parolo; por forigi tiun ĉi maloportunaĵon, ni — anstataŭ enkonduki tiun novan — montras nur, ke laŭ la reguloj de nia lingvo ni povas uzi ne sole „tie ĉi", sed ankaŭ „ĉi tie", el kiu ni jam tre bone povas fari „ĉi tiea" aŭ „ĉi-tiea". Evidentiĝas lenta artificio.

Same „ajn" (cetero aldonata nur al la vortoj demandaj, plivere rilataj) estas vorteto tute memstara, kies devenon mi ĝis nun ne esploris. (Laŭ la sono ĝi egalas al la germana „ein", ekz. „kia (ajn) = „was für ein", „ein jeder".) Lippmann (Zamenhofs sprachliche Gutachten n-ro 62a) prave asertas, ke la nedifinaj pronomoj kaj adverboj havas du signifojn, ekz. iu = 1. iu certa persono aŭ objekto, kiun mi nur ne volas aŭ povas nomi; 2. iu nedifinita tute ĝenerale. En la dua senco oni ja povas aldoni „ajn".

Krome la tabelaj vortoj ebligas multon da deriviĝoj, do ankaŭ ĉiurilate genia solvo de lingva problemoj!

Ĉu tamen la sistemo tute kontentigis la aŭtoron? Almenaŭ en tiu tempo, kiam li vole-nevole medlatis pri „ŝanĝotaĵoj" (originala verkaro, p. 150), li interalie projektas ankaŭ „la ŝanĝon de la tabelo da interŝtataj pronomoj kaj adverboj. Estante vortoj tre gravaj kaj uzataj sur ĉiu paŝo pli ol ĉiuj aliaj vortoj, ili ofte malhelpas per sia longeco kaj multe gajnus, se ili estus kiel eble plej mallongaj . . . Do ni (Zamenhof en la

Zamenhof kaj la neologismoj.

En la novembra numero de „Literatura Mondo" Prof. G. Waringhien per artikolo „Majstroadmiraŭ aŭ idolkulto" ekzamenas la sintenon de Zamenhof rilate al la neologismoj.

Prof. Waringhien volas, evidente, per la ekzemplo de Zamenhof, pravigi sin, Kalocsay kaj la skolon de „Literatura Mondo"; sed al mi ŝajnas, ke lia argumentado ne estas pruvanta.

Julio Baghy jam atentigis, sur miaj paĝoj, ke la situacio de Zamenhof neniel estas komparebla kun tiu de iu nuna verkisto, eĉ se ĉi tiu estas tiel talenta, kiel Kalocsay; kaj plue, li prave rimarkigas, ke la stato de la Esperanta vortaro en 1908 kaj en 1933 estas tre diferenca: en 1908 la oficiala vort-

provizo estis malgranda, dum nun ĝi estas ege ŝvelinta.

Cetero, oni devas distingi inter neologismoj: evidente, se mi preparolas pri sveda lando, mi nepre devas enkonduki vortojn, kiaj oero, fjordo k. s., dum, se mi parolas pri Italujo, mi eble ne povos rezigni pri karabinero, polento, rizoto . . .

Ni rigardu, kiom da neologismoj Zamenhof bezonis por la traduko de verko tiel vastampleksa kaj diverstema, kia estas la „Malnova Testamento". En la numero de marto 1930 de „Rivista Italiana di Esperanto" mi publikigis „Liston de Zamenhofaj komunaj vortoj ankoraŭ neoficialaj", t. e. ne entenataj en la Universala Vortaro kaj en la tri unuaj Oficialaj Aldonoj.

Nu, la neologismoj de la Malnova Testamento estas ĝuste 87; sed ili estas apartigeblaj en tri klasojn: a) zoologiaj, botanikaj kaj mineralogiaj vortoj: bedelio, boŭtaŭro, galbano, geko, gipaelo, gofero, hirako, fiameleono, ibelkso, jaspiso, kasio, kofero, koriandro, krizolito, lapo, levjatanu, ŝgurio, ŝkusto, mandragoro, mergulo, monituro, nardo, nigelo, oleastro, olibano, pandiono, perikoptero, sikomoro, skinko, stakto, tragelaflo, ŝupupo, uromastiko; b) nomoj de specialaj vestoj, uzurumoj, iloj, lokoj: arkeo, lbat'o, 'belk'o, cidaro, darkemono, efo, efodo, ger'o, ĥin'o, ĥitono, ĥomero, ĥesito, ĥokaro, ĥor'o, ĥog'o, ĥin'o, omer'o, psalterio, ŝabeko, ŝikto, ŝeolo, ŝabernaklo; c) aliaj vortoj: anatemo, aŭguro, bisino, celebri, firnamento, ĥuli, grego, ĥordo, ĥinkrusti, ĥolumno (eble eraro?), ĥultivi, ĥevido, ĥistelo, ĥarabolo, ĥparcelo, ĥperversa, ĥplacento, ĥplago, ĥplejado, ĥpreskribi, ĥsedimento, ĥsilĥivo, ĥsino, ĥsiroko, ĥskorio, ĥstrebi, ĥtamburino, ĥtreti, ĥtribo, ĥvizio, ĥvokto.

Nu, la du unuajn klasojn da vortoj apenaŭ oni povas nomi neologismoj: ili apartenas al la teknika vortaro. Restas do nur la tria klaso, kun 31 novaj vortoj. Pensu do! Zamenhof por traduki venkon tiel malfacilan, varian, ampleksan, kia estas la Malnova Testamento, bezonis nur 31 novajn vortojn! Kaj rimarku, el tiu malgranda nombro, 15

jam registris Bojrac (1908—09) kaj 5 estas proponitaj de Grabowski (1910) en liaj polaj vortaroj! La novaj vortoj efektive elpensitaj de Zamenhof estas do nur **dekunu!**

Zamenhof estis tre ŝingarda ĉe la alprenado de novaj vortoj en la lastaj jaroj, kiam la Esperanta vortprovizo fariĝis sufiĉe riĉa.

La invado de la neologismoj montriĝis ĉe la verkado de plenaj nacilingvaj vortaroj: la vortaristoj kredis sin devigataj traduki la tutan vortrezoron de sia gepatra lingvo kaj tial enkondukis amasegon da novaj vortoj pli-malpli bone elektitaj. Eble, la plej elpensema estis J. Rhodes, kiu, per sia angla-esperanta vortaro (1908), proponis pli ol 2000 novajn vortojn, ne enkalculante la geografiajn nomojn de li esperantigitajn.

Sed, efektive, la granda plimulto de tiuj proponoj neniam ekvivis: ili estis malvive naskitaj kaj restis entombigitaj en la paĝoj de la vortaroj.

Vere estas, ke de tempo al tempo alia vortaristo aŭ vortokolektisto eltombigas ilin kaj penas enlylovi en ĥin iom da vivo; sed la provo, pleje, malsukcesas kaj la esperantistoj daŭrigas uzi la kutimajn ĥummetojn aŭ derivaĵojn. Vane oni krias, ke ili estas neprecizaj, pezaj, malraciaj; ili vivas, dum la novaj vortoj, kiuj devus ilin anstataŭi, kuŝas senvivaj en la vortomuzeo!

Stefano La Colla, LK.

I. Uzado adverbeca.

- a) Li ricevis belan donacon de sia onklo.
b) Mi estas amataj de siaj gepatroj.

II. Uzado atributa.

- a) Li meditas pri la vortoj de sia fianĉino.
b) La pli juna frato estas la plena portreto de sia mortinta patro.
c) Abrahamo estis maltrankvila pro la malgajeco de sia edzino.

Ankaŭ en la dua kategorio **sia** rilate al la subjekto de l' tuta frazo sonas tute natura*, kaj estas menio dubinda. Ne estante lingva falkisto, mi ne povas akiri al mi precizan ideon pri ĉi-tiu karakterizaĵo de l' prepozicio „de“. Sed la praktiko mem rekonas la uzadon de **sia**, ne per teorio, ne per gramatika komentario. Se mi, malfeliĉe, renkontiĝos kun tiuj gramatikistoj, kiuj permesas **sia** kaj paralele lia (!) en la frazoj sub II, mi povos fari ja menion, ol enĵi al ili la grandan feliĉon, ke ili vivas en la plej brila or-epoko de ĥia propra tre-fleksiva gramatiko.

5. Ĉiu korniko serĉas similan al si kaj tio ĉiam estas korniko. (F. II 62/17.)

Neesprimado de la havanta de l' eco simila kaŭzas, ke oni facile malatentas la ŝlosilan vorton similan, kaj lasas ĝian modifanton ĥimili de la subjekto de l' tuta frazo.

Por ĉio verkita kaj por ĉio improvizita ili ne havas egalajn al si en la mondo.

Tia Maja stango, kia forĝis el ĝi, certe ne havas similan al si sur la tuta tero. (F. III 129/23.)

Tio estas unu el la praktikaj esprimmanieroj, kiuj estas ŝatataj de l' generaladlingvano libere de teoriaj kritikoj de l' ortodoksa gramatiko; meniu rajtas ĝin tuŝi sen nepra neceso. Sed la supre-dirita ne signifas la neuzblecon de la formo al ĝi; al ĝi estas eble plikorekta formo, kiel diras ankaŭ D-ro W. Lippmann. Mi supozas, ke kelkaj el vi, por kompletigi la frazon kun la korniko, konstruos la parafrazon: Ĉiu korniko serĉas ion, kio estas simila al ĝi. Tia parafrazo certe egalvaloras al la originalo kiel realaj okazoj, sed la parafrizado mem ne helpas al la gramatikisto konstati la ĝustan uzblecon de tiu aŭ alia formo; meniam decidkapablaj estas la parafrazoj en la gramatika kampo. Ĉe la parafrizado oni devas esti ĉiam ŝingarda, por ke oni ne ludu la rolon de tiu magia artifikisto, kiu figuras ĥion ajn el menio fiere antaŭ la rigardantaro; tiu magia artifikisto, kiu, kiel gramatikisto, pravigus la frazojn: Rajdi sur leono estas danĝera (afero). Tie mi vidis fraŝlinon (kiu estas) tre bela. Li mortigis la infanon (maskitan) de lia amikino.

Ankaŭ rimarkinda ekzemplo el Zamenhof estas la jena:

... laŭ la ĥomuna famo ĥi havas en tiu ĉi punkto nenium egalajn al si. (H. 163/6.)

Ĉu mi povas sekvi la ekzemplon de mia Majstro kun plena trankvileco?

*

Antaŭ ol fini la skribadon mi devas tuŝeti ankoraŭ iom da specialaĵoj per kelkaj vortoj.

1. Restu tajloro ĉe via laboro. (P. 1001.)

Ne predikku ĥnabino al via patrino (P. 1214.)

* Sed ankaŭ: Si respondis, tre atente observante la enportadon de siaj (prefere al siaj) pakajoj.

Pri la refleksiva pronomo.

De Meguru Takahaŝi.

(Atentu ankaŭ la antaŭan artikolon sub sama titolo en Lingva Kritiko n-roj 15 kaj 16 [aprilo kaj majo 1933].)

Sufiĉe da ĥinoj mi jam forskribis en diskutoj pri la demando: ĉu la reganto de tuta frazo reaperas ne nur kiel refleksiva, sed ankaŭ kiel nerefleksiva pronomo, se post la subjektiva „de“? (rilate al la 4-a parafrazo de la instrukcio de D-ro W. Lippmann).

Mi nun rapidas transiri al la postrestantaj parafratoj, por aldoni al ili kelkce da klarigaj vortoj de mia ĥankio.

1. Vi multe ĝenas min, kiu estas okupata de sia laboro.

Vi multe ĝenas min, kiu mi estas okupata de mia laboro.

Ĉi tie temas, por diri ĝenerale, pri la persona modifiteco de l' relativa propozicio; sed ĝuste tial, ke Esperanto ne konas la konjugacion laŭ nombro kaj persono, la afero ĥoncernas en ĝi nur la refleksivan formon de l' relativo. Ankaŭ ĉe la relativa uzado de „ĥiu“, respondis al mi D-ro Lippmann, estas aplikebla la regulo montrita en ĥia „La refleksiva pronomo en Esperanto“ I: La substantiva vorto kiu (samkiel la aliaj u-vortoj ĥorelativaj) apartenas gramatiko al la tria persono, ankaŭ kiam ĝi rilatas al la unua kaj dua. Tamen tion kontraŭstaras, mi tre timas, la angloj, aŭ la francoj, kiuj valoras la anticipon multe pli alte ol la relativon; la anticipo estas la reganta subjekto de la relativa propozicio, kaj la relativo mem estu ĝia senpotenca ŝajnsubjekto; ĥi do ŝatus mia pli ol sia en la donita okazo, dirante: Vi multe ĝenas min, kiu estas okupata de mia laboro. Konflikto inter germana kaj angla-franca elementoj! Sed por prijuĝi la konflikton troviĝas neniu mezurilo de kutimo, nek de logiko, nek de simetrio; tial la plej bona, ĥion oni povas fari nun, estas lasi ambaŭ formojn sen rompo kaj forigo, ĝis kiam kon-

cerne tiun punkton stariĝos kutimo, propra al Esperanto.

Dume ŝajnas mienkomprenebla la neuzado de **sia** (la posesiv-refleksiva formo nur por la tria persono!) en la dua ekzemplo, kvankam ĉi-tiu estigas ĉe ni, pliradikale, la dubon, ĉu en Esperanto, kiel en la germana lingvo, estas ĥonata la kutimo — **ripeti la personan pronomon post la relativa, al kiu ĝi antaŭiras.**

2. Ke „si“ kaj „sia“ povas signifi reciprokecon sen „reciproke“, „unu la alian“ ktp., ne postulas ian specialan studon; jen pri ilia reciprokeco restas al mi menio grava por paroli, ĉar jam klaran aferon klarigi estas vere sensecaĵo! E. Ĉefeĉ en sia „La elementoj kaj la vortfarado en Esperanto“ p. 49, esprimas tre interese: Reciprokaj verboj estas verboj refleksivaj, kiuj okazas nur en la multnombro, kaj ĉe kiuj la ago ne rilatas al la subjekto en sia tuteco, sed al ĝiaj konsistigantoj reciproke.

3. Ke tu ricevu justan punon por lia krueleco!

Unu el la taskoj de la prepozicio kun substantivo aŭ pronomo estas tiu de modifado al la verbo, al la substantivo, al la ad... jam sufiĉas. Kiam ĝi estas supozata kiel rekta atributo (modifanto) al iu substantivo, ĉi-tiu ŝajnas esti plej ĥimprese ĥinfluenta sur la uzadon de l' refleksiva en tiu prepozicia frazero, ĥompare kun la aliaj subjekt-taŭguloj. Mi rekomendas tralerni „La refleksiva pronomo en Esperanto“; en ĝi ĉe H 5 a oni trovas multajn praktikajn ekzemplojn kun tre konciza komento de la aŭtoro. La sekvanta subparafrazo H 5 b montras, ke la substantivo esprimanta agon havas la superan kapablon allogi al si la refleksivecojn en la prepozicia frazero. Ke tiu ricevu justan punon por lia krueleco! Sed estas iom alie kun la prepozicio „de“. Vidu la sekvantajn ekzemplojn:

La vortoj tajloro kaj knabino estas kvazaŭ — vokativoj, eble kaŭze de tio en la supraj proverboj oni trovas via anstataŭ sia.

2. Sia estas kara pli ol la najbara. (P. 347.)

Cio sia estas plej ĉarma. (P. 357.)

Sia en la subjekta parto ekaperas ne tiel miriga, kiam oni rimarkas, ke tie sia esprimas la ĝeneralan refleksiivecon, nome mia por mi-ulo, nia por ni-ulo, via por vi-ulo ktp. Same: singarda, sintenado, sinoferema. Koni sin mem estas malfacile.

3. La ekzemploj: ŝi . . . lasis ilin ludi sur sia granda sponga brusto (F.K. 49/20) — tium, kiu staras tiel modeste en la angulo kaj lasas kraĉi sur sin (F.H. 4/20) — prurvas, ke la uzado de si kaj sia fiksigas iafaje laŭ la sentoj de l' skribanto (aŭ parolanto).

4. D-ro Lippmann skribis al mi responde al mia demando:

„Mi rekomendas:

- mi kaj mia edzino mortigis nian propran infanon;
- mi kaj mia amiko mortigis ĉiu sian propran infanon aŭ mi mortigis mian infanon kaj mia amiko la sian;
- mi kaj mia amiko interŝanĝis niajn opiniojn;
- mi kaj mia amiko interbatalis aŭ . . . batalis unu kun (kontraŭ) la alia.

La aliajn proponojn mi opinias neĝustaj aŭ almenaŭ malpreferindaj.

Al mi, vi kaj ni neniame rilatas si aŭ sia. En la frazo post a) mi + mia edzino = ni. Do: nia rilate al la komuna infano. En la frazo post b) manke de komuna objekto ankaŭ komuna pronomo ne estas uzebla. Do ni devas aŭ enŝovi la vorton ĉiu, al kiu rilatas sia, aŭ disigi la subjektojn same kiel la objektojn, donante al ĉiu de ili la taŭgan pronomon. La frazo post c) sekvas la regolon de la frazo post a). Oni ne povas kontraŭdiri, ke la opinioj ne estas komunaj, ĉar ĉiu havas siajn proprajn apartajn opiniojn. Efektive la interŝanĝataj opinioj kune (kiel ili aperas de gramatika vidpunkto) apartenas al mi ambaŭ, do ili kune estas niaj opinioj. La frazo post d) povus teksti ankaŭ: mi kaj mia amiko batalis inter ni, ĉar mi + mia amiko = ni, sed la supre don-

itaj tekstoj estas pli klaraj, do stile preferindaj.

5. Antaŭe mi frazigis mian propran difinon de la refleksiva pronomo, kion la atentemaj legantoj devas ankoraŭ memori: **Refleksiva pronomo estas reapero de aganto pero de koncepto esprimanta (la) agon.** — Prefere mi metu la artikolon antaŭ la vorton „agon“. Ĝian plenan taŭgecon mi tamen ne pretendas, ĉar mi bone scias, ke ĝi ne validas por kelkaj kazoj, en kiuj si aŭ sia rilatas al la subjekto ne pere de koncepto esprimanta agon. Kial mi devis doni tian difinon, elastan, abstraktan kaj ag-konscian? Tion simpatie komprenos tiuj, kiuj bone ekkomprenos ĉiujn karakterojn de la pronomo refleksiva.

*

Ĉu la uzado de si kaj sia ne ekŝajnas al vi multe pli komplikata ol kiam vi legis mian artikolon? Jes? sed certe ne per mia plumo! Malgraŭ tio mi timas, ke vi ricevos tian impreson, kvazaŭ mi intencas nur teorie kompliki la simplan uzadon de si kaj sia, kaj konfuzi la komencantojn, kiuj naive kredas, ke la gramatiko de ĉiuj lingvoj estas tute simpla, kaj enhavas nur dek ses regulojn.

*

La penson, ke la Esperanto-gramatiko estas absolute simpla, mi ne povas senkonfide aprobi, ĉar oni neniame povas imagi, ke nur dek ses reguloj kapablas kompletigi la tutan gramatiko-sistemon de unu homa lingvo. Por publikigi novan internacian lingvon, la aŭtoro devis doni antaŭ ĉio pli aŭ malpli da gramatikaj reguloj; tio estas la Fundamenta Gramatiko. Poste niaj antaŭuloj riĉigis la esprimaron, kaj maskigis interkonsentitaj, laŭkute sekvataj manieroj de esprimado eĉ tie, kie ne regulas la Fundamenta Gramatiko. Ili estas nenio alia ol praktikaj normoj, kiujn priskribi apartenas al la tasko de l' gramatiko. Do ankaŭ la Esperanto-gramatiko povas esti malsimpla, kaj tio estas nenio malĝojinda. Sed estas merefutebla fakto, ke ĝi estas simpla kompare kun la gramatiko de iuj ajn naturaj lingvoj. Jes, la gramatiko de Esperanto ja estas karakteriza per sia kompara (relativa) simpleco!

ata kiel vorto, kiu enkondukas frazermodifilon kaj montras la rilaton en senco de ties ĉefvorto aŭ esprimo al la modifataĵo de la frazero. Nenio estas dirata, postulanta ke la ĉefvorto de prepozicia frazo devas esti substantivo aŭ pronomo; kaj en ĉiuj ĉefaj lingvoj adverboj estas libere uzataj kiel tiaj ĉefvortoj. En la ĉefaj eŭropaj lingvoj, almenaŭ, infinitivoj estas tiel uzataj, kaj ne malofte aliaj esprimoj, eĉ frazeroj aŭ foje propozicioj. Esperanto tre libere uzas adverbojn kiel ĉefvortojn de prepoziciaj frazeroj. Ekz. en la F.K., p. 35, l. 5 de malsupre; p. 40, l. 21; p. 64, l. 24; p. 62, l. 4 de malsupre; p. 64, l. 9; p. 87, l. 3; p. 126, l. 29 — ĉi tiu kazo estas tre rimarkinda pro la fakto, ke per nenia streĉo de la imago povas la adverbo esti rigardata ĉi tie kiel anstataŭanto de hipotezata substantivo; p. 180, l. lasta; p. 212, l. 15. Ankaŭ en la Fundamento, adverboj (kvankam laŭ mia scio neniame adverboj participoj) estas uzataj post prepozicioj, ekz. en la tria linio de Ekz. 23 (rimarku bone, ke ĉi tie la adverbo estas absolute nura adverbo, ne povas anstataŭi eĉ reve ian substantivon de lokoj); kaj Ekz. 26, l. 2 de malsupre. Zamenhof ankaŭ tiel uzis tutajn propoziciojn, ekz. F.K., p. 86, l. 1; p. 213, l. 15 de malsupre; p. 280, l. 16; p. 307, l. 5 de malsupre.

Kian rajton povas pretendi la „kie“ en „Tra kie do ni volas eliri,“ estis substantivo? Nur ke eble oni povas hipotezi, ke ĝi pense anstataŭas substantivon signanta lokon (eĉ tio estas neebla en la du specialaj kazoj pririmarkitaj supre, unu en la Fundamento mem). Sed tio estas multege pera kaj kvazaŭa ideo kompare kun la efektiva substantiveco, kiun per sia propra naturo mem la infinitivo posedas — kaj kiel la scienco de lingvistiko montras, ĉiam posedis de la plej praa tempo. Se vorto tute sen ja rekta substantiveco kiel adverbo (kaj eĉ foje propozicio aŭ frazero tia, kia „multe da peno“ sekvanta post „per“) povas tre libere sekvii propozicion en Esperanto, tiam ĉiom nekritikebla infinitivo havas eĉ pli certan rajton tion fari. Neniu rajtas mallaŭdi ĝin.

La gajno por la lingvo, en libereco, varieco, kaj ĉarmo de esprimo estas granda. Kiel multe pli konciza kaj belata esprimo: „inter plani kaj fari estas ja granda diferenco“, ol „inter la planado kaj la farado“ ktp. — kaj eĉ pli forta la avantaĝo, se oni volas meti rektajn objektojn post la „plani“ kaj „fari“. Fakte Zamenhof mem uzis „inter enrigardi en densan arbaregon kaj sukcese trairi ĝin“ en n-ro 36 de „La Esperantisto“ 1891 — p. 96, l. 7 de malsupre en D-ro Joh. Dietterle'a Originala Verkararo de D-ro Zamenhof, kaj tia esprimo ankaŭ troviĝas sur p. 147, l. 4 de malsupre. Mi tute ne intencas sugesti, ke la infinitivo anstataŭu la frazerojn en „-ado“ post prepozicioj. Nur ke ĝi prenu sian rajton lokon flanke de ili. Kaj precipe utila troviĝos la infinitivo kun sia rekta objekto, por eviti troecon da malfertaj formoj kiel „-ado“ sekvanta de prepozicio, ktp. Rimarkinde estas ke, sentante la valoron de la forto de eĉ nur kvazaŭa rekta objekto post substantivo de ago (kvazaŭa, ĉar gramatike esprimante, ĝi nur ellasis la prepozicion „je“ kaj anstataŭigis ĝian oficon per la akuzativo, laŭ reg. 14, Plen. Gram.), Zamenhof mem skribis foje „per diligenta uzado ĝin“. Nu do, „per diligente uzi ĝin“ estus bona variigilo por tiaj esprimoj. Ankaŭ Zamenhof kredeble subkomprenis (eble senkonscie) prepozicion en la esprimo „laca esti diino de la balo“ sur

Uzo de infinitivo post prepozicio.

Trege ofte dum longdaŭra verkado en Esperanto oni sentas la fortan bezonon por variigiloj de la esprimo, netaj ĉarmaj mallongaj frazeroj. Precipe trapas onin la valoro de uzo de infinitivo (kun aŭ sen sekvanta objekto) post prepozicio, anstataŭ ĉiama unutona substantivo „-ado“ kiel sekvanta prepozicio. Ĉi tial ni apude ekzamenu la aferon.

Kial ne tiel uzi la infinitivon? Tute ne la gramatiko kontraŭas, sed sole ideo de Zamenhof esprimita en Lingvaj Respondoj. Zamenhof diris, ke laŭ la gramatika naturo de la prepozicio, tiu povus preni post si nur substantivon aŭ pronomon, kaj ke en tiaj okazoj, kiaj „por, anstataŭ, antaŭ ol, kaj krom“, la prepozicio partoprenas en la naturo de konjunkcio, tial rajtante la sekvantan infinitivon.

Oni ne ŝatas kontraŭi al Zamenhof, sed ĉi tie ĝi tute forgesis esencajn faktojn. Unue, laŭ la gramatikistoj ĉiuj prepozicioj kune kun konjunkciaj adverboj kaj rilataj pronomoj partoprenas la naturon kaj oficon de konjunkcio (konjunkcio vera nur konektas

vortojn, frazerojn, aŭ propoziciojn). Due la antikva hinda-eŭropa infinitivo praes estis la akuzativa kazo de neŭtra substantivo finanta sin per „ono“ aŭ „eno“, kaj nur poste akiris veran forton verban. Multege da gramatikistoj fakte ne lasas la infinitivon havi lokon inter la modoj de la verbo, sed traktas ĝin sole kiel hipotezantan (kontraŭe al la asertantaj formoj) formon de la verbo; plue ili metas ĝin inter la participojn kaj gerundiojn kiel duon-verbon, duon-substantivon. Zamenhof mem tre libere pernesis al ĝi alpreni la oficon de subjekto de verbo; objekto de verbo; klariga modifilo (alinonita stato de apozicio) kiel evidentigas de F.K., p. 99, 2-a linio de malsupre; p. 293, 13-a linio de malsupre, egale kiel ordinara substantivo; ankaŭ tiun de objektiva kompleto.

Ni nun ekzamenu du aferojn: unue la efektivan gramatikan signifon de la prepozicio, due kiel en la praktiko Zamenhof uzis prepoziciojn rilate la „substantivo-pronomo“-demandon.

La prepozicio laŭgramatike estas difin-

p. 158, 1.4 de malsupre, F.K., kaj simila es-
 primo sur p. 155, l. 21, F.K. Se „esti“ klar-
 igus kiel nura komplemento de „laca“, tiam
 la efiko devus iri transe de la „laca“ al la
 „diino“, sed estas fakte tute male — la
 „laceco“ estis la rezulto de la „esti diino“,
 ktp. Do evidente la frazo igus kiam plen-
 skribita „Laca de esti diino, ktp.“ (Zamen-
 hof ne volis diri „laca de estado diino“, tial
 li uzis infinitivon post prepozicio kaj ellas-
 is la lastan.)

La suprajn rimarkojn mi esprimis nur post
 longa penso kaj provo — mi tradukis kaj
 verkis private je longo por esti tute certa,
 ke generala postprepozicia uzo de la infini-
 tivu ne havus malavantaĝojn. Mi ne trovi-
 s tiajn — la difinita senco de Esperantaj pre-
 pozicioj malebligas la nacilingvan fuŝon ri-
 late uzon de kiu prepozicio antaŭ kiu ver-
 bo. La afero estas tute sama kiel kiu pre-
 pozicion preni antaŭ kiu substantivo en
 „-ado“ aŭ ia alia substantivo.

J.E. Bauman, St. Louis.

Pri la prepozicio „je“.

En la Fundamento, paĝo 9, Zamenhof di-
 ras: „Estas bone uzi la vorton je kiel eble
 plej malofte.“ En la Kompletta Gramatiko
 de s-ro Fructifier ni legas, paĝo 155: „Kiam
 oni bone posedas la lingvon, tiam oni nur
 ekstreme malofte bezonas uzi je.“ Kaj fine
 s-ro Wüster en sia majstra verko, la En-
 ciklopedia Vortaro, diras pri je: „Ist in
 überlegter Sprache möglichst zu vermei-
 den“ (Estas en alta stilo plej eble evitenda).
 Tial Zamenhof ĝin preskaŭ ne plu uzis en
 siaj lastaj verkoj; en la tuta Proverbaro, por
 ekzemplo, oni ne trovas eĉ unu solan je, kaj
 hodiaŭ niaj bonaj verkistoj ĝin anstataŭigas
 per la signifa, internacia prepozicio. En
 loko de je, mi diras, ekzemple:

„Laŭ la unua rigardo; fidu al mi; li ed-
 iĝis kun ŝi; kredis al mi; senigi ĝin de lia
 mono; riĉa pri promesoj; anda de, al, por;
 cigaro de, po dek penigoj; sub la kondiĉo,
 ke . . . ; sin limigi al, per; plena de; ridi
 pri; veti per; komparu min, al mi; sopiri al;
 eni pro; konsenti ion, al io, pri io; zorgi
 pri; li estas pli alta ol mi per la tuta kapo;
 longa de dek metroj; aĝa de kvar jaroj; mi
 ĵuras per Dio; por eterne; kontenta pri; dis-
 pisti al polvo; dividi en kvar pecojn; per
 mia kostopago; k. c.

La elekto de taŭga prepozicio estas tre
 grava por la klareco de la frazo; por ek-
 zemplo, kalkulu sur mi ne estas samsenca
 kiel kalkulu kun mi; mi prenis ĉin per la
 mano signifas per mia mano kaj mi prenis
 ĉin de la mano signifas de la mano. La uzo
 de je aŭ al por signi la pasivan geni-
 tivon ne ŝajnas al mi konsilinda; kaj ansta-
 taŭ diri: la murdo al (je) la kompatinda vir-
 to de ŝia kruela edzo, mi preferus: la
 murdo de la kompatinda virino per aŭ fare
 de ŝia kruela edzo.

Malgraŭ tio supre dirita, mi opinias ta-
 men, ke la prepozicio je estas konservinda
 por anstataŭ la akuzativo, precipe kiam
 temas pri tempo aŭ loko; ekzemple: li al-
 venis je la kvara (horo); je la unua fojo,
 kiam mi lin vidis; je la deka de novembro;
 precize je la minuto, kiam li foriris; kaj:
 je la distanco de cent metroj; je la fino de
 la strato; li staris je dek paŝoj for de mi;
 la vilaĝo troviĝas malproksime de la urbo,
 je dek du kilometroj. Niaj poetoj ankaŭ ne
 malofte uzas je en loko de la akuzativo; ek-
 zemple: nenio / Lin povis devigi ne
 kredi je tio. — Li je amikeco ilia tre miras.

— Vi regnas je l' aferoj de ĉiu land', cent-
 jaro.“ (Grabowski, La ĉiro de la Esperant-
 istoj; paĝoj 45, 46, 79.) — „La mev“, simila
 al mi, / Je amatin' sopiras. — Ho, kredis do
 min: vivu, je l' morgaŭ meatende. — La
 antan', pro l' ĉac' / Je l' ĉiel' sopiras. —
 Kvankam en ĉiuj malbona, ridis mi je l'
 bird' ebona. — Je fortikaĵoj ĉasas vi, kaj
 mi . . . je karavanoj. — La Sun' malĵuna
 dum subiro / Okulis molke je l' spektaklo.“
 (Kalcocay, Eterna bukedo, paĝoj 50, 84, 173,
 199, 264, 296.) Sed tiajn esceptojn ili mem
 konsideras kiel poeziajn licencojn.

H. Boucon.

LINGVA TRIBUNO

Pra-Esperanto.

(Respondo al la artikolo de Oscar Büne-
 mann en „Lingva Kritiko“ 1/17.)

I. Se la vortoj (II A l. 9) „ŝo palla a mo“
 evidente simple signifas: „ŝi pala al
 mi“, mi devus konstati strangan preseraron
 — pro la duobla litero l. Ĉar la adjektiva
 formo, derivita el la franca lingvo (palle =
 a. pale, g. fahl), estas „pala“; komparu l. 2
 „ko ŝuoj malseĝaj e palaj“ — precize laŭ la
 germana originalo (III C). Sed tiu sama ad-
 jektivo malfonte ripetiĝas (sen konfionna
 vorto de l' originalo) en l. 9. Sendube en
 poezio ofte la verbo „diris“ estas „subkom-
 prenata“ — ne estis necese mencii citaĵon
 de la itala ĉefpoeto Dante, ankaŭ Heine en
 la dua strofo de mia poemo „subkomprenas“:
 mi al ŝi diris; tamen ĝuste pro tio por la
 kontraŭdiro li aldonas C: „sprach sie zu
 mir“, kaj Zamenhof certe imitis en B, ŝi al
 mi rediras. Do mi supozis, ke en „palla“
 subestas verbformo, kaj sekve la „simpla
 solvo“ de la problemo min ne kontentigas.

II. koncerne la interpretadon de la vorto
 „prekalle“ (l. 12) mi konsentas. Ke „kala“
 estas varma, mi jam mem konjektis; kom-
 paru l. 4 „al amoj amizaj e kalaj“. Sed se
 „pre“ estas sufikso por „tre“, ĉu ankaŭ „fe“
 povas signifi „tre, tiel, tiom aŭ plej“?

III. La vorto „si“ ne eble korespondas al la
 nuna „ja“; ĉar ĝi devas enhavi la prepozi-
 cion „i“ = en. Kaj kion signifas la antaŭa
 „et“?

Do refoje mi petas kompetentulojn pri
 pliaj esploroj. J. Penndorf, Plauen.

„Batita ŝoseo“.

En sia recenzo pri la libro „Merkado, la
 azenpelisto“ (Heroldo n-ro 27/732) B. K.
 skribas, ke li ne komprenas la formon „bat-
 ita ŝoseo“. Mi jam kelkfoje trovis tiun ĉi
 esprimon en esperantlingvaj artikoloj. Ĝi
 estas analoga al la latinidaj lingvoj, kiuj
 konas tiun esprimmanieron ĉiuj: Angle: a
 beaten way; france: un chemin battu; itale:
 una via battuta; hispane: un camino batido;
 portugale: un caminho batido kaj rumane:
 un drum bătut. (Rigardante la etimologiajn
 rilatojn de „bati“ [latine: battiere] montri-
 ĝas erara la supozo de B. K. pri parenceco
 kun la franca vorto „bâtir“ = konstrui).
 Laŭ tiuj esprimoj „batita ŝoseo“ signifas
 „ŝoseo multe uzita kaj irebla“. Kvankam
 la latinidaj lingvoj pravigas ĝin, mi ne opi-
 nias tre bona tiun esprimon, ĉar ĝi ne
 troviĝas en aliaj lingvoj kaj la Esperanta
 vorto en tiu kombino ne havas la saman
 signifon kiel en la romanidaj lingvoj la ra-
 diko „bat“.

Hans Roemer, Blankenheim-Eifel, Germ.

Ĉiun redakcian materialon por Lingva Kritiko

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo
 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por
 „Konsilanta Gramatiko“, redaktata de s-ro
 Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.

Eldonejoj

de novaj Esperanto-gramatikoj, vortaroj kaj
 similaj libroj prilingvaj, dezirantaj specialan
 kritikon pri tiuj libroj en „Lingva Kritiko“,
 estas petataj sendi po unu ekzemplero al la
 ĉefredaktoro s-ro Stefano La Colla, Via
 Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Ni atentigas speciale, ke temas ne pri re-
 cenzoj, sed pri serioza kritiko de libroj pri-
 lingvaj, do ne de verkoj beletristikaj k. sim.

Ĉiuj

ekzistantaj libroj pri stilo, gramatiko kaj vort-
 farado de Esperanto estas haveblaj ĉe la Libro-
 fako de Heroldo, Köln, Brüsseler Strasse 94